



Ekde 'enrigardi' ankaŭ en MalDekstra rando




Diag. 17 (Ĝusta kurso 7-19) Sekve de N17, Blanko savas siajn tri ŝtonojn per B18. Ĉi tiu meto samtempe nuligas Nigran teritorion ĉe punkto 'a', do valoras 7 poentojn.

Nun Nigro celu MalDekstran randon. N19, ĉi tio estus la plej malfacila ŝtonmeto en ĉi tiu problemo.


{paĝo 307 de la originalo}




Diag. 18 (Mirinda N3) Kontraŭ N1, respondo per B1 neniigas postan zorgon. Ĉi tiam N3 estas 'mirinda meto'. Blanko neniel povas kapti ĉi tiun ŝtonon.



Diag. 19 Blanko nepre devas ŝtonmeti B4. Nigro kompreneble eskapante 'suben-iras' kiel N5. (Se anstataŭ B4, Blanko ŝtonmetus B5, Nigro sinligus per N5, kaj punktoj 'a' kaj 'b' fariĝas 'alternativaj'. Blanko fuŝus.)




Diag. 20 (Nigro 'tenas metrajton') Prave Blanko 'sinligas' per B6, Nigro 'transvadas' kiel N7, kaj Blanko blokas per B8. Blanka teritorio fariĝas 8 poentoj, adiciante 2 poentojn de 1 kaptito kaj 6 poentoj de punktoj 'a'.




Diag. 21 (Blanko 'perdas metrajton') Kontraŭe, se Blanko unue ŝtonmetas ĉi tien B1 'bloki', procedos N2 kaj B3, kaj la blanka teritorio fariĝas 11 poentoj.


Do Nigra lim-aranĝo en diagramoj 18, 19, kaj 20 valoras '3 poentojn metrajton-tenante'.
{paĝo 308 de la originalo}




Diag. 22 Kontraŭ N1, eblas respondi per B2.




Diag. 23 Nigro 'tranĉas' per N3, Blanko 'suben-iras' kiel B4. Sekve, kiam Nigro ŝtonmetas N5, malbona estas B-a. (Ĉar la blanka teritorio fariĝas 7 poentoj.)



Diag. 24 Bona estas ĉi tiu B6. Kontraŭ N7, eskapas kiel B8. Same kiel en diagramo 21, Blanko faris 8 poentojn da teritorio ĉi tie.




Diag. 25 Kontraŭ N1, se Blanko 'sinligas' per B3, Nigro 'mirinde ŝtonmetas' N2. Do ĉi tie Blanko respondas per B2 sur la 'vitalan punkton'. Tamen Nigro 'tranĉas' per N3.




Diag. 26 (Blanko malgajnas 1 poenton.) Procedas ĝis B8. En ĉi tiu kazo, la blanka teritorio fariĝas 7 poentoj. Anstataŭ B6,...


{paĝo 309 de la originalo}




Diag. 27 (Blanko malgajnas multe.) se Blanko 'blokas' per N1, Nigro 'suben-iras' kiel N2 kaj rezultas 'kunvivo'. (Sekve procedas B-a, N-b, B-c, kaj N-d.)



Diag. 28 Plu unu ekzemplon de Blanko fuŝo. Kontraŭ N1, kia estas respondi per B2? Same Nigro 'tranĉas' per N3.




Diag. 29 Sekve procedo ĝis N9 estas unu el la varioj. Ankaŭ fariĝas kunvivo. Anstataŭ B4,...




Diag. 30 se Blanko ŝtonmetas B1, Nigro 'sin-ingas' per N2. Sekve, se Blano volus 'fari okulon' per B-a, Nigro 'suben-irus' kiel N-b. La 'kapt-konkuron' venkus Nigro, gajnante multon.

{paĝo 310 de la originalo}




Diag. 31 Laste montras kurson de Nigra fuŝo. Se Nigro eraris en 'met-ordo' inter N1 kaj N3, Blanko forkaptas unu ŝtonon per B2 kaj B4, kaj Nigro malsukcesas. Sekve, se Nigro 'tranĉas' per N5, Blanko respondas per B6, kaj Nigraj ŝtonoj estas tute kaptitaj.

La formo de la Maldekstra angulo estas interesa, kaj eblas aliaj varioj. Bonvole vi mem esploru.



Diag. 32 (Ĝusta kurso 19-33) Ĝis B26, Nigro sukcese malmultigas blankan teritorion, trans-iras Supren, kaj ŝtonmetas N27. Ĉi tiu estas meto kun eta tekniko.
{paĝo 311 de la originalo}




Diag. 33 Kontraŭ N1, respondi per B2 estas sensenca, aŭ malgajnama ĉar donas al Nigro 'kompensejon por alterne-kaptado', N-a.

Blanko prave respondu per B30 en diagramo 32. Antaŭ ol ĉi tio, Blanko 'metrajton-tenante' ŝtonmetas B28.

Cetere, en unue montrita fuŝa kurso {diagramo 2}, anstataŭ N27 en diagramo 32, Nigro 'metrajton-perdante' lim-aranĝis, kiel N-a {en diagramo 32}, B30, kaj N27. Ĉi tiu N-a sidas sur libera punkto, kaj Nigro kvazaŭ perdis unu meton.

Sekve de B30 {en diagramo 32}, Nigro efikigas interŝanĝon de N31 kaj B32, kaj N33 en centro fariĝas la lasta lim-aranĝo. Kaj la ludo finiĝas {en japana regulo}.

Se Nigro ne ŝtonmetus N31,...



Diag. 34 Blanko farus 1 poenton per B1. (Nigro ne povas ŝtonmeti N-a, ĉar Blanko havus rimedon B-b.)

{paĝo 312 de la originalo}